

Enirante la Akceptejon, la kongresano preligu sian kongreskartonon, por ricevi la kongresafajon. La eksterlandanoj transdonu sian pasportojn al la urba oficejo, kiu kolektas ilin kaj prizorgos la restadpermeson.

Biletaj por la festoj kaj ekskursoj estas haveblaj en la Kongresejo (Kulturverein).

Kronu la verkon, venu Nürnberg'on!

Loka Kongresa Komitato.

Kroniko.

Por servi nian legantaron per ĉiam aktuala, fidinda kaj kompleta informaro, ni bezonas scindaĵojn (sur poŝtkarto aŭ aparta folieto unuflanke skribita, sed ne inter administrat' aŭ privataj scilaĵoj) pri ĉiu novaĵo el la Esp. movado. Kondiĉoj: rapide, koncize, fidinde, legible (precipe nomo).

Landoj.

Ameriko.

Usono.

Sub la prezido de s-o Sussmuth de la 11.—14. julio okazos en North Hudson la 16-a jara kongreso de la Esperanto-Societo de la teritorio de Hudson. Speciala propaganda kunveno estas aranĝita, al kiu ĉeestos la plej bonaj ticiaj Esperantistoj. La programo estas tre interesa.

Aŭstrio.

Salzburg (Aŭstrio). La unua Esperanto teatraĵo. En ĉefepiskopo Borromund (Parsch) esti aranĝata la prezentado de legenda teatraĵo „Tarcizio“ de F. Prast, tradukita de D. F. Christianell la 24-an de junio. Tre bone kaj vigle ludis studentoj de l' kurso gvidata de la iradukinto. Inter multaj profesoroj ankaŭ ĉeestis Esperantistoj de Salzburg kaj kelkaj neesperantistoj. Ĉiufleke oni laŭdis la belan reprezentadon.

Wien. — Asocio por Komercio kaj Helplingvo Tutmondaĵ en Wien. — Laŭ invito de ĉi tiu asocio kunvenis la 16-an de Majo 1923 en la festalono de la Wien-a Foiropalaco proksimume 80 reprezentantoj de diversaj ŝtato-oficejoj kaj korporacioj, por pritiraki la rezolucion deciditan de la Internacia Konferenco en Venezia laŭ propono de la Komercia Ĉambro en Paris, kiu postulas la ĝeneralan enkondukon de Esperanto. Estis reprezentitaj i.a. la aŭstria ministriero por Komercio kaj Trafiko, kaj por Eksteraj Aferoj, la Ĉefunuigo de la Industriistoj, Korporacio de la Wien-a Komercistaro, Asocio pormetia, G'ldo de la komercaj agentoj, Komercia Ĉambro en Linz, Komercia Muzeo en Wien, nova Wien-a komercakademio, Komercakademio de l' korporacio de la Wien-a komercistaro, Internacia Foiro de Wien, Urbestirara oficejo de Wien, laŭ landaj porfremdulaj asocioj en Wien kaj Grez, la Asocio por Vaporŝipveturado sur la Danubo, kelkaj eminentaj eksporfirmoj de Aŭstrio k.m.a. La referanto pri la konferenco en Venezia povis uzi la raporton senditan de la aŭstria konsulo en Venezia, s-o registara konsilisto A.M.Poppauer, al la Ministerio por Eksterlandaj Aferoj, kiu permesis la publikan uzon de ĉi tiu dokumento. La ĉeestintoj akceptis ĉiuvoĉe la jenan rezolucion:

„La kunvenintoj atendas, ke la kompetentaj oficejoj ŝtataj, korporaciaj, entreprenoj, senescepte ĉiuj rondoj interesataj je la evoluo de komercio kaj industrio kaj de porfremdulaj aferoj en Aŭstrio, decideme kaj urĝe entreprenu ĉiujn taŭgajn preparojn por plena eluzo de Esperanto por la internaciaj rilatoj je la bona de la ekonomio Aŭstria!“

En Wien raportis pri la Internacia Konferenco en Venezia 16 jurnaloj, la kunveno en la foiropalaco menciis 10 gazetoj.

Polujo.

Bydgoszcz. Seimdepulito A.Pankratz el Bydgoszcz faris la 19. 6. 25 en pola Parlamento interparolo pri Esperanto, kiu presigis multaj polaj kaj preskaŭ ĉiuj germanlingvaj gazetoj en Polujo. Publikigo de la traduko sekvas en la proksima numero. La konstantan disvastigon de Esp. en Polujo montras interalie la konata pola lernolibro „Samouczek“ de prof. L. Kronenberg, de kiu nun aperis jam tria eldono kun sume 18000 ekz.

Lublin. La 27. 6. 25 komenciĝis somera kurso de Esp., aranĝata de Lublina Rondo Esperantista.

Miłoslaw. S-o poŝtestro Prubacki farigis prezidanton de la „Internacia Ligo Esperantista por Poŝtistoj“ por Polujo; fakanoj turnu sin laŭ adreso: s-o Prubacki, poŝtestro, Miłoslaw. — La red. de Polua organo „Poczia“ promesis daŭre propagandi Esp. en la gazeto. Okazis la IV-a konferenco de „Pola Esp. Societo“.

Radom. S-o Fr. Dybus favore propagandas, same s-o Kijak, inter poŝtistoj. Pola Esperanto Servo, Bydgoszcz.

Rusujo.

En la Protektoraron de SEII eniris kelkaj plej eminentaj ŝtataj, politikaj kaj sciencaj agantoj:

1. O. D. Kamen'eva, membro de Internacia Laborista Helpo por Soveta Rusujo.
2. Feliks Kohn, membro de Prezidkomitato de Centra Plenuma Komitato de Unuigo de Sovetaj Socialistaj Respubl.
3. K. Mehonosin, prezidanto de la Sportinternaciano.



Sporta Societo „Esperanto“ en București (Rumanujo).

La piedpilka trupo.

Personoj: 1. s-o E. Robin, filo de la iama konata propagandisto D-ro Robin. 2. s-o H. Morarescu (kapitano). 3. s-o C. Scarlatescu.

Kiel ni sciigis el korespondado en București Sporta Societo „Esperanto“ estas fondita. Ni havas la plezuron ĉi-supre montri al niaj legantoj la ludantaron de ĉi tiu ĉi societo.

4. A. Butjagin, rektoro de la elektroteknika instituto de Sindikato de poŝt-telegraf-radioj (Interligilo).
5. Prof. Kitiĵer kaj Evgenjev, vic-rektoroj de la sama instituto.
6. Prof. Rejnsner, membro de la Socialista Akademio.
7. N. I. Podvojski, vic-prezidanto de la Societo de Amikoj de Aersiparo.
8. Slavinski, prezidanto de Sindikato de arlaborantoj.
9. Bela Kun, eks-prezidanto de Soveto de Popolkomisaroj en Soveta Hungarujo.
10. Deszö Bokányi, eks-komisaro popola por Justeco, en Soveta Hungarujo.
11. Kobozev, eks-prezidanto de ministraro en Ekstrem-Orienta Respubliko.
12. Nemec'ev, membro de Kolegio de Supera Juro.
13. Polakov, prezidanto kaj direktoro-administrato de Moskva poligrafia fako („Mospoigraf“).

Gazetoj.

Boletín de la Agrupación Escultista, Barcelona. Majo. France Europe Orient, Paris. 15. 6. Kun kvaraĵa aldono franca-Esperanta „Internacia komercio per Esperanto“. Spótdzielca Lubelski, Lublin, 15. 6. Noto pri Esp. kurso. Informations Sociales, Genève. 15. 6. Oficiala gazeto de Intern. Labor-Oficejo. Conice Czesłochowski, Cresołchowa. 15. 6. Pri Venezia. New Jersey Post, Town of Union (N. J.). 16. 6. Deutsche Rundschau Bromberg. 21. 6. Kun ĉefartikolo pri interparolo al la ministro de intern. aferoj por spionado ril. al la politika agado de polaj Esperantistoj. Jugoslavenski Narod, Split. 24. 6., 26. 6., 1. 7. Vecer, Zagreb. 25. 6. Pri la I-a Jugoslava Esp. Kongreso. Volkszeitung, Bromberg. 27. 6. Kun ĉefartikolo pri interparolo al la ministro de intern. aferoj por spionado ril. al la politika agado de polaj Esperantistoj. Latvija, Riga. 30. 6. Kun artikolo pri la XV-a kongreso. „Der Bund“, Frankfurt a. M. N. 28. 5. 6. Oficiala organo de la Intern. Foiro de Fim.; ĉefartikolo germana-hispana. Die Neue Zeitung, Wien. 30. 6. Pri foiro de Leipzig, invito viziti la Esp. diservon aranĝitan la 4. 7. de la Aŭstria Katolika Ligo Esperantista. Das Neue Licht, Wien. Junio. Diskuto: Ĉu Esperanton aŭ ĉi tiu? Głos Lubelski, Lublin. 1. 7. Pri Venezia. Latvijas Karēvija, Riga. 1. 7. Pri Venezia. Jugoslavenski Narod, Zagreb. 5. 7., 4. 7. Reichenberger Zeitung, Reichenberg. 4. 7. Pri jarkunveno de la Ligo de Germ. Esp. Soc. en Ĉeĥoslovakio. — Malgrandaj notoj — 4. 7. Pri Nürnberg. Selber Tagblatt, Selb. 4. 7. Pri Nürnberg. Hamburger Anzeiger, Hamburg. 5. 7. Pri Nürnberg. The Open Road, London S. W. 1. Julio.

Aktuala Politiko.

Ameriko.

Pasintan Majojn finis siajn laborojn la Kongreso Tutamerika, kiu kunsidis en Santiago de Chile, ĉefurbo de Ĉilio, dum preskaŭ unu monato.

La kongreso alprenis gravajn decidojn, kiuj efikas favore la rilatojn inter la sud-kaj nord-amerikaj respublikoj tie reprezentitaj. Bedaŭrinde por diversal motivoj restis for de la kongreso tri gravaj landoj: Meksiko, Peruo kaj Bolivio; la unua pro tio ke siaj rilatoj kun Usono estas interrompitaj kaj la aliaj pro tio, ke ankoraŭ ne estas solvitaj la problemoj, kiujn naskis la milito inter ili kaj Ĉilio antaŭ multaj jaroj, kaj kies rezulto estis la perdo por Peruo de du provincoj, kaj por Bolivio de haveno en la Pacifika Oceano, kiu estis la sola rekta elirejo al la granda maro.

La sukceso de la kongreso ne estis plena. Oni ne povis interkonsenti pri senarmigo, kaj post longa diskutado la kongresanoj disigis nenion decidite pri tio. En la blua ĉielo de la amerika politiko aperis nubo, malgranda ja, sed tia, kia sendube kumpurtos maltrankvilon.

Ne aŭdiĝas bruo de armiloj, sed vidiĝas, ke la registaroj sin okupas pri la kondiĉoj, en kiuj troviĝas la ter- kaj mararmeo, kaj penas utiligi al si la spertojn de la lasta eŭropa milito.

Malsukcesis ĉiuj penoj por atingi interkonsenton. Ne estis eble trovi justan rilaton por kontentigi ĉiujn. Kian mezurilon uzi? Ĉu la forto de la nacio devas esti en rilato kun la nombro de sia loĝantaro? Ĉu ĝi devas akordiĝi al la vasteco de sia teritorio? Ĉu al la graveco de sia komercio?

Ĉio estis vana. La afero restis nesolvita, kaj la rezulto de ĉi tiu malkonsento jam montriĝas: malkonfido kaj suspektemo.

Dum la kongreso estas akcentita la diferenco de kriterio inter Nord- kaj Sud-Ameriko rilate al la eŭropa politiko. Al la usona formulo de „Ameriko por la amerikanoj“ Sud-Ameriko proklamas ĉi tiun „Ameriko por la tuta mondo“.

La interveno de Usono en la granda milito havis favoran influon al la sudamerika tezo, kiu pli bone akordiĝas kun la intereso kaj inklino de tuta Sud-Ameriko.

Urugvajano.

Prof. John Dewey de Columbia Universitato asertis: „Usono ne devas aliĝi al la Monda Tribunal gis kiam internacia leĝo malebligante la militon estos akceptita“. Prof. Dewey diris: La internacia leĝo nun estas bazata sur la principo, ke milito estas laŭleĝa, la fina apelacio por finigi disputojn, kaj ke la nuna internacia maŝinaro estas

*) Monroe-doktrino.

efektive milita sistemo. La ideo, ke ĉi tiu milita sistemo povas esti forigata per laŭstapara dekonstruo, estas la plej granda sofismo, kiun oni iam allrudis al inteligentaj personoj. Tiu ĉi metodo de laŭstapara dekonstruo plej multe nur firmiĝis ĝis nun la artifikajn eblojn je kontraŭa agado. Tute kontraŭe do la milita sistemo estas perfektigita per ĉiuj rimedoj de la scienco kaj kun la rapideco kaj certeco al kiu la paca rekonstruo ne povas konkuri nuntempe.

(Laŭ „Philadelphia Ledger“ [Usono] de kunveno de Unitarian Laymen's League en Boston la 21-an de majo 1923)

Ch. G. St. M.

Internacia trafiko.

Aerpoŝto.

La aera poŝto de Atlantika oceano ĝis la Pacifika. Transporto de leroj el New York ĝis San Francisco dum 28 horoj.

New-Jork Post-Office Department sciigas ke en sekunda julio aŭ aŭgusto komenciĝos senpera aerpoŝta komunikilo inter New York kaj San Francisco. Tiu distanco je 5000 mejloj la poŝta aeroplanoj trafalugos dum 28 horoj. La iriono de la vojo aviadisto devas flugi dum nokto.

La aerpoŝto forlasados New York'on antaŭ tagmezo kaj atingos urbon Chicago antaŭ la kreausko. Tie la poŝton prenos alia aviadisto en alia aeroplano kaj li flugos okcidenten, konkurante kun la suno. Dum la tagigo la aeroplano alteriĝos ĉe urbo Cheyenne en ŝtato Wyoming. La tria aeroplano kaj tria aviadisto prenos ĉi tiu poŝton por kun ĝi transflugi la altajn montojn de Rocky Mountains kaj Sierras kaj atingos San Francisco'n sur la okcidenta bordo antaŭ la sunsubiro.

Per fundaj esploroj kaj eksperimentoj la Poŝta direkcio sukcesis garanti al la nokta flugo inter Chicago ĝis Cheyenne la saman certecon kiel dum tago. Fortaj lanternoj montras al la aviadistoj la vojon trans la preloro. La lumo el tiuj lanternoj estas tia, ke ĝiaj radiol povas atingi en aeron ĉe dum tre malfavora vetero. Per la he po de tiuj „lumuroj“ la aviadisto sen ia malfacio sekvas nokte certan vojon en la aeraĵ tajtoj. La aeroplano mem portas tre fortan reflektan lanternon, per kiu la aviadisto povas trovi al si konvencan lokon por la okaza alteriĝo. Sur ĉi tiu 25-a mejlo estos oficaĵ stacioj, kiuj dum nokto ankaŭ estos lumigitaj. Krom ĉi tiuj instalaĵoj la flugo mem estos tre oportuna, ĉar la tersuperfaco, super kiu flugos la aeroplano estas ebenaĵo, sur kiu oni povos iacie alteriĝi. Tiujn alteriĝajn lokojn oni povas renkonti preskaŭ ĉi kaj la aero super la preloro estas sek' kaj sen granda vaporoĵo, kio faciligas la eblecon bone atenti la lumomontrojn.

La loĝantoj de Middle West, laŭlonge de tiu servojo, noko povos vidi tre belajn lumfenomenojn. „Aurora borealis“ are farita estas unu el tiuj fenomenoj kaj lumigita ĉielo estos ĉirkaŭvidebla ĝis la distanco je 50 km. Tiu ĉi lumo aperos por la reflektio de aero lumigita per protekciaj lumigiloj el kvin grandaj stacioj: Chicago, Iowa City, North Plate kaj Cheyenne. Ĉiu el tiuj lumigiloj eljetos la lumon de 600 000 000 kandelitoj! Krom tiuj grandaj lumigiloj estos multege da pli malgrandaj, kies lumfluo estos videbla trans 50 mejloj. Tiuj lumigiloj troviĝos sur ĉiu interspaco de 25 mejloj kaj servos al la aviadisto kiel montrolo. La lumigiloj por la aerpoŝto estos tute aliaj ol maraj lumuroj, kiuj preservas ŝipojn. La direkto de la radiol nature estos tute malsama. La lanternoj meliataj sur piedestaloj turniĝos ĉirkaŭ sia akso trifoje dum ĉiu minuto kaj sendos la radiol al la ĉielo, ili funkcios nur dum tempo, kiam oni atendas la transflugon de la aeroplano. Sed ĉi tiu ne estas ankoraŭ ĉio. En la okazo, se la „plafono estos malalta“, kiel termiĝas aviadistoj la veteron, kiam nuboj tre malalte rampas super latero la aviadisto estos devigota flugi ankaŭ malalte, kio povus kaŭzi ke li ne rimarkus lumojn de la grandaj lumigiloj. Por ke tio ne okazu laŭlonge de la tuta vojo oni starigos ordinarijn je distanco de 5 mejloj ĉi. Kiam la aero estos klara kaj diafana kaj la aviadisto flugos en aleco de 7000 metroj, li povos vidi luman strion senfine zonuonantan la amerikan kontinenton. La poŝta aviadisto devos batiĵ kun multe pli grandaj malfacilaĵoj ol tiuj, kiujn aviadistoj havis dum la milito. La lastaj povas atingi grandan kvietan altajon, de kiuj ili observis la ĉirkaŭaĵon, dum la poŝta aviadistoj devos flugi de vespero ĝis mateno. La militaj aviadistoj ordinare elektadis pli oportunan veteron por siaj ekspedicioj, dum la poŝta aviadistoj ne povas atendi la veteron, nek la venton, sed devas flugi malgraŭ ĉio.

Preskaŭ iriono de la jaraj transflugoj tage estos submetata al neĝo, pluvo, hajlo kaj nebulo kaj ia noktaj veturoj en tiu veterstato estas ankoraŭ pli malfacilaj.

Per la instalo de la nokta transflugo oni povos sendi lerojn el New York al San Francisco kaj returne, kaj ili atingos la celon la sekvantajn tagojn. La poŝta direkcio esperas, ke la loĝantoj vige uzos la servojn de la aera poŝto kaj por tiu celo estas preĝigitaj specialaj aerpoŝtaj markoj.

Skito

Tunel-konstruo.

Prezidante hieraŭ ĉe ordinara kunveno de la Channel Tunnel Co. Ltd. (Kompanio kun limigita kapitalo por Tunelo inter Britio kaj Francujo), Barono d'Eranger diris, ke s-o Bonar Law, dum li estis ĉefministro, estas preta rekonsideri la demandon, ĉu la registaro helpos, sub kondiĉo de garantio, ke kompanio provizos la necesan kapitalon. Deputitaro de la Suda Fervojo estus esinta la plej bona garantio, sed je tiu tempo la klopodado pri la Suda Fervojo estis tiel granda ke la deputitaro ne estas aranĝita.

Laŭ The Daily News (Londono) junio 21. Charles G. Stuart-Menteth, B. A.

Fiziologio.

La deknua Internacia Fiziologia Kongreso okazonta je 25.—27. julio, prezidote de prof. Sir Edward Sharpey Schafer, F. R. S., kunvenos en 3 sekcioj: ĝenerala, hemia, farmakologia. — sed ĉe la komenctago prof. J. J. Macloed, F. R. S., faros paroladon pri insulino.

British Medical Journal, 25. junio 1923, pĝ. 1072. Ch. G. St. M

— 155 —

Por ne troŝargi nian administradon dum kaj tuj post la kongreso, bonvolu tuj plilongigi vian abonon minimume ĝis numero

— 155 —

Agrikulturo.

Antaŭ revolucio en la agrikulturo.
(La eksperimentoj de Prof. M. Popov.)

La iltrovo de la profesoro de la Sofia Universitato, Prof. M. Popov, pri la ekstinta ago de certaj saloj sur la ĝermaj ĉeloj de plantoj, jam estas aplikata en la praktiko per eksperimentoj sur bulgara grundo en la agrikulturo. La esperoj estas grandaj. Kaj granda estas la merito de tiu bulgara scienculo.

Tie ĉi ni transdonas resume la raporton pri tiuj eksperimentoj de la gazeto „Agronomo“ (15. 2. 1923), organo de la societo de la bulgaraj agronomoj.

Per eksperimentoj estis pruvite, ke, se oni agas sur maturajn nefruktaĵajn ovojn de la silk-papilio, la mar-erinaco k. a. per solvaĵoj de diversaj saloj kiel: magnezia duklorido, magnezia sulfato k. a., ili komencas dividiĝi kaj doni ĝermojn, kiuj atingas certan fazon de sia disvolvado. Prof. Popov mem agis per similaj saloj sur infuzoriojn kaj ricevis la sekvantajn rezultatojn: dum unu patrino infuzorio ĉe ordinaraĵ kondiĉoj dum sep tagoj donas 242 filinajn infuzoriojn, ĝi donas — traktata kelkajn minutojn per solvaĵo de saloj — en tiu tempo 2027 filinajn. En plantoj en vintra dormo, per iniektado sub certaj burĝonoj de solvaĵo de l' samaj saloj, oni povas atingi disvolvado de tiuj burĝonoj ĝis floro. La salojn, kiuj kaŭzas fortan dispartigon kaj disvolvado, Prof. Popov nomas „Stimulacioj“; kaj ilian agon mem — stimulas.

Elirante el tiuj ĉi faktoj, Prof. Popov provas stimuli semojn el diversaj kulturoplantoj (tritiko, maizo, milio k. a.) Ankaŭ tie ĉi la rezultatoj estas frapantaj. De egalaj spacoj, semitaj je diversmaniere preparitaj semoj de milio, estas ricevite: de sekaj semoj, ordinare semitaj — 93 gr. da fruktoj; de trempitaj en minerala akvo de Gornja Banja (kuracloko apud Sofia) 341 gr.; de stimulantaj kun magnezia duklorido kaj mangana sulfato — 600 gr.; kaj kun magnezia sulfato kaj mangana sulfato — 630 gr. Krom tiu ĉi evidenta diferenco de la akiritia kvanto da semoj, estis diferenco ankaŭ en la kresko de l' plantoj mem: la stimulantaj semoj donis plantojn pli altajn, pli dikajn kaj entute pli fortikajn; iliaj ĉeloj estis pli grandaj, la interrilato pli forta. Identajn rezultojn Prof. Popov ricevis ankaŭ ĉe la eksperimentoj kun aliaj kulturoj. Ĉe tio — laŭ ĉio — ŝajnis, ke la stimulantaj semoj donis plantojn, kiuj atingas sian plenan disvolvado en pli mallonga tempo.

La eksperimentoj estas tranportitaj jam sur praktikan fundamenton. Kiam estas alni konate, la Ministerio de l' Agrikulturo kaj la eksperimentaj stacioj bulgaraj donis volonte vastan subtenon al Prof. Popov, kaj jam estas entreprenitaj eksperimentoj en larĝa skalo kun aŭtunaj semoj. La rezultatoj de tiuj eksperimentoj, faritaj sempre en la agrikultura praktiko mem kaj ĉe la kondiĉoj de la bulgara agrikultura mastraroj estos decidaj.

La demando estas grava; ĝi meritas specialan atenton kaj plenan subtenon, ĉar sukceso en tiu ĉi direkto preskaŭ duobligos la produktadon. Krom tio la saloj, per kiuj estas traktataj la semoj, estas malkaraj kaj oni facile laboras kun ili. Ili estas preferindaj al la preparatoj „Fertiliza“ k. a. — kies konsisto estas sekrete gardata —, kiuj tre kare estas proponataj de spekulantoj en Okcidento.

J. H. Krestanoff.

P. S. La urbestro de Dresden ricevis pri la sama temo lerton el Sofia, kiu enhavas i. a. jenajn klarigojn: La semoj semotaj devas kuŝi dum kelkaj horoj antaŭe en kemia solvaĵo aŭ en mineralakvo (el mineralfonto). Tiu ĉi semoj donos duoblon da fruktoj, kiam la sammaniere sed simple semitaj. Ĉi mineralakvo estas uzbla escepte la akvo de Ra-fonto, kiu malakcelas la kreskadon de l' frukto.

Internacia Sporto.

Velboato „Sowitasgoht 5“ elveturinta de Hamburgo.

La 28-an de junio post adiaŭa soleno en Neumühlen dum noktiĝo, la velboato por la riska ekveturo estis pretiĝita.

Akompanite de adiaŭaj-kaj hurakrioj la malpeza boato gliiis en la nokton, renkonte al malproksima celo. —

Samideanoj sur Kanariaj insuloj kaj New York estas petataj sciigi la alvenon de „Sowitasgoht“ al legataroj de „E. T.“.

400 n-ojn

kostas dumviva abono je ET.

20 n-ojn

ni skribos en la konton de ĉiu, kiu verbas al ni dumvivan abonanton en bonvaluta lando.

XII-a Germana Esperanto-Kongreso Plauen (Vogtlando), Pentekoste 1924.

La tagoj de la XV-a Universala Kongreso alproksimiĝas, kaj ni Plauen-anoj havas la esperon renkonti en Nürnberg multe da geamikoj, kiuj intencas viziti la germanan kongreson en nia bela urbo de la pintoj kaj brodkurtenoj. Ni salutas ilin jam nun!

En Nürnberg oni havos bonan okazon por aliĝi. Pro la malbona germana valuto oni bedaŭrinde estas devigataj plialtiĝi la kongresokoston, sed la aliĝintoj, kiuj jam pagis sian kotizon ĝis nun, restas kongresmembroj sen devigo de iu postpago. Malgraŭ tio la kongresa kaso bezonas libervolvajn postpagojn.

La kotizoj ĝis 31. aŭgusto estas la duono de la kotizo por la Nürnberg Kongreso. Validas do la jena tabelo: Por germanoj, aŭstroj, hungaroj, poloj kaj rusoj po 5000 gmk.; por la aliaj eksterlanduloj en iliaj valutoj: belgio 15 fk., britoj 10 ŝil., danoj 10 kr., ĉeĥoslovakoj 25 kr., finlandanoj 37 1/2 fmk., francoj 25 fk., hispanoj 12 1/2 pes., italoj 25 liroj, nederlandanoj 5 guld., norvegoj 10 kr., svedoj 7 1/2 kr., svisoj 10 fk., usonanoj 2 dol. — Edzinoj kaj infanoj pagas la duonon.

Donacoj por la kongresa kaso ni multe bezonas por la alegaj prezoj.

Adreso por monsendoj: Vogtländische Bank, Plauen. Ĝi havas poŝtekan konton Leipzig 898, sed oni bonvolu informi la bankon, skribante, ke la elsendita mono estas por la Germana Esperanto-Kongreso Plauen.

Adreso por skribaĵoj: Hermann Scheider, Plauen, Gunoldstr. 40.

Fakkunsidoj. Pro deziritaj fakkunsidoj oni plej eble baldaŭ skribu al ni, por ke ni serĉu en Nürnberg okazon por prepari detalajojn.

Travojaĝantoj ĉiam vizitu la Esperantistaron en Plauen, sed anoncu antaŭe, se eble, vian alvenon!

Hermann Scheider, Plauen (Vogtl.), Gunoldstr. 40.

Ĉu lojale?

En „La Nova Epoko“ de februaro troviĝis jena noto (reprezo el ET):

„En B.... mortis 25. novembro 1922 de fitizo fervorega Esperantisto, Prez. de loka Esp. grupo V. K. T. Li havis grandegan korespondadon kun aliendaj samideanoj, kaj ĉiujn siajn rimedojn oferis por tiu ĉi korespondado kaj kolektado de markoj, ĉar ili ankaŭ estis filatelistoj. Post li tute sen rimedoj restis la malsana edzino kaj du filoj.“

Ĉar ankaŭ aliaj gazetoj jam represas tiun nekrologon (ekz. „Arbeiter-Esperantist“), ni vidas nin devigataj — por savi la honoron de la mortinto — atentigi, ke la reprezo ne estas kompara. La nekrologo en ET enhavas post la nomo de la mortinto sekvantajn frazojn, kiujn oni subpremis:

„Tenisov estas 50-jara kaj 29-jarajn Esperantisto. Li loĝis en multaj urboj kaj urbetoj de Ruslando: Odesa Moskva, Nijnij Hebarovsk, Bĝogovesensk, Srotensk, Nikolaev sur Amur, Vladivostok, Petrograd, Omsk kaj Barnaul, kaj ĉie li estis organizante de Esperantaj grupoj kursoj ktp.“

Tiuj frazoj montras, ke T. ne estis nura freneza poŝtmarkokolektanto. Kompreneble ankaŭ ni malaprobas la kolektan manieron, same kiel ni malaprobas ĉian troigon, ekz. ankaŭ ĉe sporto. Ni konsentas, ke la lasta frazo en la nekrologo elvokas al moko. Sed oni restu lojala kaj rekonu ankaŭ la meritojn de mortintoj. Cetere ni ne kredas, ke la kolektado de s-o T. senrimedigis lian familion, sed la malsanoj.

Parolejo.

185 La polismoj en Esperanto.

Rilatas al 167.

En ET 132 aperis en „Parolejo“ la rimarko de s-o Ch.-M. St.-M. (London), kiu miras, ke la Esperanta prefikso *ge* estas klarigita ĝis nun nur per germana *Geschwister* (ĝeratoj), kaj ne per nederlanda *geuzen* (geestantioj) aŭ per sveda *Gemälen*. Mi opinias, ke estas grave scii, de kiu lingvo prenis ion D-ro Zamenhof forante Esperanton. Tial mi aldonas por sciivolemoj, ke oni trovas en Esperanto kelkajn vortojn kaj ecojn, kiujn mi povas klarigi kiel devenantajn el pola lingvo.

Vortoj, prenitaj en Esperanton el lingvo pola estas jenaj: *ĉerpi* (pole: *czyrpać*), *bulko* (pole: *bulka*), *kolbaso* (pole: *kielbaso*), *vi* (pole: *wy*), *sama* (pole: *ten sam, ta sama*).

Dirante frazon: *ni iris po du*, ni povas scii, ke la vorto *po* devenas el pola lingvo, kiu ĝin uzas ankaŭ en la sama senco. Polo diras ĉiitan frazon: *Szliśmy po dwóch*. Da ofiksoj Esperantaj havas polan devenon: *pra* kaj *ul*. Esperanta *pra* estas uzata en la sama senco en pola lingvo: *praavo* = *pradziadek*. Ankaŭ en la sama senco aperas en pola lingvo Esperanta *ul*: *nigra* = *czarna* kaj *czarna* (legu: ĉarnula) signifas en pola lingvo *nigulinon*.

Mi aldonas, ke akcento Esperanta estas la sama kiel en pola lingvo: sur antaŭlasta silabo.

Leopold Kronenberg, Bydgoszcz, Polujo.

186. Rilatas al 143 kaj 164.

Mi aprobas la proponon de s-ano Ch.-G. Stuart-Menteh skribi kun grandaj komencletoj, laŭ la angla kutimo, ne nur la nomojn de la necianoj kaj de la urboj, sed ankaŭ la geografiajn adiekvivojn, ĉar la uzo de tiu skribmaniero estas klara kaj ian malutilon mi ne vidas. La Pavianoj ne estas pavianoj nek la Sardinoj sardinoj la Kuboj kuboj.

187. Plendo pri neporto de insignoj.

Dum unu flanko multaj vojaĝantoj rakontas interesajn okazintaĵojn, kiam ili per reciproka portado de la Esperanta sielo konatigas kun fremdaj samideanoj kaj akiras ofte tre valoran kaj bezonata helpon, tre multaj plendas, ke ili en fremdaj urboj preskaŭ ne trovas verdsejlojn kaj nur poste en la grupkunveno oni hazarde rekonas, ke ili jam vidis unu la alian sur la strato. Per reciproka portado de la insigno oni ofte havas okazon uzi Esperanton, do eĉ se iu por la propaganda valoro de la insigno ne portu la sielon, almenaŭ portu ĝin por povi okaze helpi al aliaj!

P. B.

München.

Ĉu vi scias ion dirandan pri ĉi tiu bela urbo?

Jes, tie oni fabrikas la bonan, brunan, bavaran bieron, konatan en la tuta mondo.

Certe, la biero de München ĉu ordinara, ĉu speciale fabrikita, ĉu marie, ĉu el la bierfabrikejoj „Salvator“ aŭ „Benno“, estas bona. Ĝi pliserenigas la ĝojantojn, ĝi konsolas la malĝojajn, ĝi refortigas la lacajn kaj ofte jam revivigis duone malvivajn. Kaj samkiel la biero de München estas trinkinda, tiel ankaŭ ĝiaj trinkejoj estas



Libfrauenkirche (Madona preĝejo).

vidindaj, precipe la fama Hofbräuhaus, la senĝena, hejmeca ejo, kie sidas ofte sur unu benko flanke de iu senhavulo altrangaĵa persono, flanke de sinjorina moŝto foirvendistino. Enigante la brunan, freŝan, ŝaŭmantan fluidaĵon ili diskutas la senfinan senvalorigon de la germana marko, la senĉesajn prezplialtiĝojn de ĉiuj ĉiutagaĵaĵ bezonaĵoj. Ili sidas tie, se ne en rondo familia, tamen certe en bona harmonio — situacio aliloke tute neimagebla.

Sed feliĉe, feliĉege, la bona biero estas nur unu el la karakterizaj eroj de la laŭproverba heimeco de München (germane: Münchener Gemütlichkeit, plensence ne tradukebla vorto). Krom iom da senĝeneco, ĝi precipe enhavas ankaŭ multe da bonhumoremo, efektiva bonhumoro, ne nura ĝojo pri buego, sed ĝojpovo pri senmalica spritaĵo, pri situaĉia komikaĵo. En multaj, ne imieblaj amuzejoj ĝi estas zorgata en nia urbo, plej tiel eble en la Platzl'.

Plue la atmosfero de München distingigas per artkomprenejo de la enloĝantoj. La artmetio, la pentroarto, la skulptado estas reprezentataj en München per maĵstraj videlaj en tia perfekteco nur en malmultaj grandurboj. Ĉiu nur iom klera homo jam aŭdis pri la belaj de la malnova pinakoteko, de la gliptoteko. Belajemo gvidis la tutan formadon de la urba bildo. Granda nombro da akvoricaj putoj, pentritaj ĝardenajoj ĉarmigas la aspekton de ĉiu el la multaj placoj. Multaj majestaj konstruaĵoj nobligas la modernajn stratojn, dum malgrandaj, malmodernaj dometoj en la antaŭurboj Aŭ kaj Giesing estas kvazaŭ forgesitaĵoj el la pasintaj jarcentoj.

Ĉu mi portretu la pentrandan valon de la verda isaro aŭ de la pli malproksimaj montarlagoj: Kochel-, Walchen-lago kaj la perlo de la tuta bavara almontaro, la Reĝolago? Ĉu ne estas preskaŭ petolaj, se oni ekintencas laŭvorte pri-skribi la grandiozaĵojn de la reĝaj kasteloj, de la ĉarma Linderhof, de la pompa Herrenchiemsee, de la fiera Neuschwanstein?

Samideanoj negermanaj kaj germanaj, ne pret-lasu la bonan okazon ĝui antaŭ aŭ post la kongreso la aspekton de ĉi tiu eminente bela regiono! Vi certe rememoros ankoraŭ multajn jarojn poste pri via ĉiurilate interesa kaj ĝuplena, sudbavara ekskurso.

En la semajno post la kongreso oni aranĝos ĉiutage kunvenojn de la samideanoj de München, kie oni vin bonvenigos kaj informos la travojaĝantojn. Gvidado tra ĉiuj grandbierfarejoj (Franziskanerbäuer) kun tria ĝiaj instalaĵoj estas projektata la 10-an aŭ 13-an de aŭgusto.

Vi opinias, ke restado en München tromplplenigas vian monujon jam tute senhavigitan en Nürnberg! Ho! Ekkzistas en München ardo da samideanoj, kiuj volonte vin loĝigos ĉe si je samideanaj prezoj. Kaj certe ankaŭ en nia urbo la vivokostoj ne estas pli altaj ol en alia germana urbo.

Turnu vin al la ĉiitaj delegito de UEA (H. Tressel, Parkstr. 22) aŭ vicdelegito (H. Koch, Ringseistr. 8) aŭ al la Esp. Kartelo (Lindwurmstrasse 145). De tie vi baldaŭ havos respondon kun la dezirita informo

Dr. Dr. Fr. Fr.

o/y Suomen Urheiluaitta A/B
 Finlanda Sportmagazeno A. S.
 Helsinki, Finlando, Fabianinkatu 16.

| | | |
|---|---|--|
| Eksportas: Finlandajn skolojn, lancojn, diskojn, (reda)stedeojn "puukko"-francilojn k. a. sportilojn. | Demandu niĝin prezojn Sendu ofertojn | Importas: Armlinojn, biciklojn, boatmotorojn ktp. |
|---|---|--|

JUS APERIS "IDOJ DE ORFEO"
 INTERESA ORIGINALA ROMANO DE H. J. BULTHUIS, L.K.
 Rekomendita de Esp. Lit. Asocio. — 542 paĝoj, 12 1/2 x 18 cm.
 Prezo: 2.35 guld., plus 0.50 guld. sendokostoj. Menditoj ricevas
 la verkon post kiam ili sendas la monon. Libristoj havas rabaton.
 ! "Idoj de Orfeo" estas libro por ĉiuj Esperantistoj. !
 precipe ankaŭ por la junularo, skoloj ktp.
 Menu de la entreprenanto: La Anonima Societo "Centra
 Esperanto - Libro en De H. Haag (Direktoro: F. C.
 Koens), Bankstraat n-o 2-4

**Dum la Olimpiaj Ludoj en Antverpeno
1920 estis uzataj de ni fabrikataj**
LANCOJ KAJ DISKOJ
 kiel oficialaj sportiloj.

Ni fabrikas ankaŭ aliajn sportartilojn, kiel ŝuojn
 por kuro, piedpilkado, gimnastiko kaj lukso,
 dorsosakojn k. a.

Uzu sportartilojn kun la marko de skianta urso.
 Ili estas forlikaj kaj kun unuakvalita fasono.

Niaj fabrikaĵoj estas eksportataj iam en grandaj
 kvantoj al Svedio, Norvegio, Anglio, Francio k. a.
 landoj, kaj ili estas ĉiutage pli kaj pli demandataj.
 Observu: Nurni, Kolehmainen, Hoff, Klumborg
 Biewitt k. a. uzas niajn (ŝikil)ŝuojjn.

Revendistoj!
 Petu nian novan ilustritan katalogon!
OY. URHEILUTARPEITA
SPORTARTICLES CO LTD
 HELSINKI, FINLANDO, MERIMEHENK. 38-40

Taglibro de Vilaĝpedelo
 Interesa romansimila rakonto de la dana verkisto
 Blicher. Tradukita de s-ano Bulthuis, LK-ano. Re-
 komendita de ELA.

Prezo: por malbonvalut. 0.75 gmk. multpl. per ŝlosilin.
 por bonvalut. 0.75 svls. flk. aŭ egalvaloro.

Por sendkostoj oni aldona 10% al la supre nomitaj prezoj
Buĝin & Jung, Godesberg (Germanujo)
 Esperanto-eldonejo, Bahnhofsstr. 30
 Postfeca konto Köln 920.36.

Konstantinopola Komercservo
 W. Zielinski
 Galata, Pantelejmon han Konstantinopol.

Ĉiusepacaj komercaj aferoj kaj informoj. Eksporto
 de enlandaj produktaĵoj: lano, kotono, tabako,
 opiumo, sekaj fruktoj, nuksoj, orientaj daŭloĵoj.

Simon Täger & K-io, Sofia, Bulg.
 komercado pogrande,

akceptas komercaĵojn komisie
Reprezentado Importo
 de ĉiusepacaj artikoloj.
 Eksporto
 de bulgaraj produktaĵoj.
 Importas kaj reklamas diversajn patentojn,
 senpage informas ĉion kon-
 cerne siajn artikolojn.

Por nia Esperanta fako ni serĉas fidindan kaj pruvitan
kompostiston.
 Ĉe kontentiga laboro la posieno estos daŭra kaj
 agrabla.
 Presejo T. & H. Jung, Horrem bei Köln, Germanlando.

Mivokas vin per la fajfsignalo
Vivu Esperanto
 Marŝo Esperantista de A. Menzel.
 Eldonoj: Por ĉiuj svls. fr. 0.50.
 Por ortepiano svls. fr. 0.80.
 Por fortepiano kaj violono svls. fr. 1.—
 Por malgranda orkestro svls. fr. 1.75.
 Por granda orkestro svls. fr. 2.25.
 Por ĉiuj orkestropartoj svls. fr. 0.20.

Sendkostoj 10 %
 Menu ĉe:
 G. Menzel, Leipzig-Gohlis, Menckestr. 41, Germ.

ĈIULANDAJ KOLEKTANTOJ ATENTU!
 Mi deziras interŝanĝi poŝtmarkojn ĉiulande (rekomendite),
 sed iel, ke la sendado ricevu la sendokostojn! Sendu manko-
 liston de Eston. k. Polio. Mi havas ankaŭ multajn sov. pm.-
 Volonte koresp. let. k. pk. li. Havigas kontraŭ pm. monerojn,
 pk. il. gazetojn ktp. — L. Lange, Nieswicz, Pol., Benedykt 8.

"THE OPEN ROAD"
 Eldonata la unuan de ĉiu monato. 3 d. po numero.
 La gazeto de Skotlando, Natursocio kaj Eksterdomismo.

Internacia Cirkulado.
 Esperanto kaj Eksterlanda Fako, al ĉiuj
 korespondantoj tra la mondo kontribuas.
Celadas Ligon de la Homaro.
 Sendu vian larabonon de tri anglaj ŝilingoj (malbonvalutaj
 landoj) aŭ de kvar ŝil. (bonvalutaj landoj) al la administranto
"The Open Road",
 Denison House, 296 Vauxhall Bridge Road, London S. W. I., Angl.

Mandeseĝnoj!
 Kontraŭ 2 ŝil., 1 guld., 2 sv. kr., 1 peso, 1 jeno, 2
 pesetoj, 2 sv. frank., 1 dolero, 10 liroj en rekomend-
 ita (registrita) letero. — Ali Akber Ehm, oficejestro,
 poŝtfolio 105, Zittau/Sa. (Germ.)

Anoncetoj.
KOMERCISTOJ, ELDONISTOJ de ĉiuj ajn prospektoj en
 Esperanto, dezirantaj ilian senpagan propagandon en
 Pontojo, sendu minimume po 10 ekz. de ĉiu speco al "Pola
 Esp. Servo" en Bydgoszcz (Polujo). [2]

FINLANDA SPORTEVLUO. Esperanto-Numero, kiu en
 riĉe ilustritaj artikoloj de eminentaj specialistoj priskribas
 gravajn sportfakojn en la unua sportilando de Eŭropo.
 Enhavas portretojn de Nurni, Kolehmainen k. a. mond-
 majstroj. Nepra interesa al ĉiuj sportanto. La sola Esp.
 eldono pri moderna sporto. — Prezo: 2 valdaj resp.
 kup, aŭ monbiletoj la valoro de 1 flk. Adr.: Suomen
 Urheilulehti, Erottaja 4, Helsinki Finlando.

BONKORAJ KURACISTOJ. Mi malsaniĝis antaŭ 4 jaroj
 je spinkuraciado, sed ĝis nun mi ankoraŭ ne resaniĝis.
 Laŭ konsilo de la iaj kuracistoj mi poris gips-korseon
 dum 4 monatoj, sed sen ulu. Ĉar laŭ lia opinio la ku-
 riĝo estas tre malsure. Se iu el vi scias certan kurac-
 ion al bonaj konsilioj, mi petegas vin helpi al mi.
 Aleksandr Parov, str. Miladinova 21, en Rusĉuk (Bulgar-
 ujo). [2]

ELTROVAJOJ novaĵoj mi peras por disvastigi en
 Estonio. Mi ankaŭ akceptas sciigojn pri novaĵoj en Esperanto por
 Estonio gaezairo. J. Vaihkeri, Luise 1, 5-11, en Tallinn
 (Estonio). [2]

DANA AŬTORO (s-o C. Jacobi, "Bakkehuser", en Hol'back,
 Danujo) kiu interesiga pri klerigo de laboristoj, ek-
 interesiga ankaŭ por Esperanto kaj pripensas ĝin
 enkonduki de Laboristo Vesperlernejo. Samideanoj, kiuj
 bone spertis pri Esp. inter laboristaro, bonvolu skribi
 informige al li — sen demandi lian respondon. — Labor-
 ema delegito. [2]

KIU BEZONAS Gablonaĵajn ornamartikolojn, turnu sin al
 Rudolf Lang, Auguste 67 en Gablona A. N. (Ĉeĥoslov.).
 Mi liveras ĉiujn artikolojn, prizorgas acetan kaj informas
 senpage pri komerco. [1]

FILATELISTOJ! Kiu sendas al mi 100-1000 poŝtmarkojn
 sielandajn nedifektajn, ricevas saman kvanton de His-
 panujo laŭ lvert 1925. Gabriel Alomar, Prez. de EKP.
 str. Vallori 14 en Palma de Mallorca (Hispanio). [5]

ILUNA SERURISTO serĉas laboron. Kie? — egal! Bon-
 volu skribi al Rupert Hillebrand en Bad Reichenhall
 (Germ.) Tirolerstr. 7. [1]

- Kongresanoj por la XV-a:**
- 5691. Roppenon Martha Elis, f-ino, Viipuri
 - 5692. D-ro Benedicty Gustavo, Trieste
 - 5693. Leibl Karl, Nürnberg
 - 5694. Goldberger Leopold, Kraków
 - 5695. Monderer Gizela, s-ino, Kraków
 - 5696. Dro. Lauer Bernard, Kraków
 - 5697. Dro. Goldhammer Jakob, Kraków
 - 5698. Goldhammer Pola, s-ino, Kraków
 - 5699. Dro. Garfunkel Izrael, Kraków
 - 5700. Garfunkel Regina s-ino, Kraków
 - 5701. Zimmermann Walter, Karlsruhe
 - 5702. Butscher Guido, Kalsruhe
 - 5703. Fleck, Hermann, Karlsruhe
 - 5704. Lamm Karl, Karlsruhe
 - 5705. Butscher Michael, Karlsruhe
 - 5706. Gaillot Paul André, Nancy
 - 5707. Šadrov Vilis, Riga
 - 5708. Wild Marie Louise, f-ino, Lyss
 - 5709. Müller Maria, f-ino, Nürnberg
 - 5710. Putz Adolf, Nürnberg
 - 5711. Mammen Louis, Grenaa
 - 5712. Brehm Grete, s-ino, Eger
 - 5713. Közler Karl, Markkibart
 - 5714. Auerbach Adolph, Lwow
 - 5715. Auerbach Fany, s-ino, Lwow
 - 5716. Auerbach Ema, f-ino, Lwow
 - 5717. Dabczewski Roman, Mikolajów
 - 5718. Dabrowski Abraham, Lwow
 - 5719. Dabrowski Amelia, s-ino, Lwow
 - 5720. Gładyszowska Iwanna, f-ino, Lwow
 - 5721. Saggiari Johano, Padova
 - 5722. Hansen Holger, Holbaek
 - 5723. Nejedly, Vincenc, Nidergrund
 - 5724. v. Waldowski Marg., s-ino, Birkenwerder
 - 5725. Engst Josef, Erlangen
 - 5726. Kuba Johann, Hermannseifen
 - 5727. v. Losquinghien Paul, Krefeld
 - 5728. Riley Marie, f-ino, Cliffe-at-Hoo Kent
 - 5729. Herrmann Edmund, Königsberg
 - 5730. Labek Fritz, Glauchau
 - 5731. Perick Joseph, Glauchau
 - 5732. Gläser Oskar, Glauchau
 - 5733. Brückne Helene, f-ino, Glauchau
 - 5734. Reich Herda, f-ino, Glauchau
 - 5735. Starke Else, f-ino, Glauchau
 - 5736. Genusälte Marco, Vilkija
 - 5737. Madernis Helene, s-ino, Kaunas
 - 5738. Eisingof Berta, f-ino, Panevezys
 - 5739. Alperavičius Samulis, Panevezys
 - 5740. Quist, Frans Albert, Kramfors
 - 5741. Fink Jaša, Rusĉuk
 - 5742. Bauer Erna, s-ino, Loerach
 - 5743. Herrmann Mariechen s-ino, Dresden
 - 5744. Herrmann Arthur, Dresden
 - 5745. Vasil Fotev, Plovdiv
 - 5746. Boris Paraskov, Plovdiv
 - 5747. Bittmann Grete, f-ino, Klosterneuburg
 - 5748. Schröder Arthur, Winsen a/Luhe
 - 5749. Schröder, Erna, Winsen a/Luhe
 - 5750. Uhlig Johanna, Oberlangen
 - 5751. Bartels Margarete, s-ino, Aachen
 - 5752. Schuster Emil, Radeburg
 - 5753. Bartova Marie, f-ino, St. Peter i/D. Au
 - 5754. Berger Leopoldine, f-ino, St. Peter i/D. Au
 - 5755. Höfer August, Wolkenburg
 - 5756. Höfer, s-ino, Wolkenburg
 - 5757. Höfer, f-ino, Wolkenburg
 - 5758. Weiss Benno, Nürnberg
 - 5759. Quoika Helene, f-ino, Falkenau
 - 5760. Nekrasov, Nik Vlad., Moskva
 - 5761. Lacialendola Adamo, Bari
 - 5762. Neglia Teresa, s-ino, Bari
 - 5763. Schwab Sofia, s-ino Mellendorf
 - 5764. Scheibl Frederiko, Wien
 - 5765. Zieroff Josefina, f-ino, Nürnberg
 - 5766. Luce Mina, f-ino, Nürnberg
 - 5767. Prigel, f-ino, Nürnberg
 - 5768. Berzin Lina, f-ino, Riga
 - 5769. Bronks Else, f-ino, Berlin
 - 5770. Barta Francesco, Chranzov
 - 5771. Adamcova Manjo, s-ino, Chranzov
 - 5772. Ziv Karolus, Chranzov
 - 5773. Königler Eduard, Weiden
 - 5774. Lauterbach Lorenz, Weiden
 - 5775. Röttger Ernst, Chemnitz
 - 5776. Ruttloff Alfred, Chemnitz
 - 5777. Röttger Hellmut, Chemnitz
 - 5778. Herold Gerhard, Chemnitz
 - 5779. Jeřábek Josef, Brno
 - 5780. Jeřábekova Roza, s-ino, Brno
 - 5781. Paschik Karlo, Gleiwitz
 - 5782. van der Heulen Henriette, f-ino, Haarlem
 - 5783. Sligting Willem, Amsterdam
 - 5784. Sligting de Vries, Amsterdam
 - 5785. Dumbeck Friedrich, Nürnberg
 - 5786. Dumbeck Lina, s-ino, Nürnberg
 - 5787. Gastner Babette, f-ino, Nürnberg
 - 5788. Schreiner Babette, f-ino, Nürnberg
 - 5789. Wedel Heinrich, Nürnberg
 - 5790. Wittmann Friedrich, Nürnberg
 - 5791. Beck Grete, f-ino, Nürnberg
 - 5792. Wedel Babette, f-ino, Nürnberg
 - 5793. Koch Käthe, f-ino, Nürnberg
 - 5794. Matzke Willibald, Pensenbeug
 - 5795. Christ, Emil, Pensenbeug
 - 5796. Radhofer Jozef, Pensenbeug
 - 5797. Köhler Oskar, Oelsnitz
 - 5798. Sarossy Mihaly, Budapest
 - 5799. Pechan Corona, f-ino, Pécs
 - 3800. Baghy Gyula, Budapest.

Korespondo kaj Interŝanĝo.
 F-ino Helena Szalanty en Hateg, Demsus (jud. Hunedoara, Rumanujo) deziras korespondi kun tulumdo per il. pk. [2]
 Kiu sendas al mi rekomend. 100-500 da sielandaj pm. (escepte Germanujo, Ĉeĥoslovakio) ĉiuj ricevos rekom. la saman kvanton de polaj aŭ Ĉeĥoslovakaj. Prof. Kronenberg, en Bydgoszcz (Polujo). [2]
 S-oj Franz Breuer, Hauptstrasse 58 kaj Max Ullrich, Nr. 131, ambaŭ en Hoheneibe, (Ĉeĥoslovakio) deziras korespondi per il. pk. kun la tuta mondo. La lasta interŝanĝas ankaŭ pm. [2]
 Vasil Nikolov, 18-jara gimnaziano, en Gorna Ĝumajo (Bulg.) deziras korespondi kun ĉiuj landoj per il. pk. (bfl.) kaj let. ĉiuteme, precipe kun germanoj. [5]
 S-o Tibor Urbanek, en Kaposvár (Hung.) Szécheny ut. 10 interŝanĝas amatorajn fotografaĵojn, pm., il. pk. (bfl.) kaj muzikverkojn kun la tuta mondo. [2]
 S-o Rudolf Polok, Szelag — Villo Graefe en Poznań (Pol.) deziras korespondi kun gesamideanoj el ĉiuj landoj pri diversaj temoj per il. pk. (bfl.) kaj let. Interŝanĝas ankaŭ amat. fotojn. [2]
 S-o Teodoro Robert Studer, 12, rue de l' Est, en Bruxelles (Belguelo) deziras korespondi kun gesamideanoj el ĉiuj landoj poŝtkarte kaj letere pri politiko, ekonomio, ĵurnalismo ktp. [2]
 Georges Cornelis, Zand 35, Lokeren (Belg.) deziras interŝanĝi pm. kaj paperonon kun gesamideanoj de ĉiuj landoj. [2]
 Por la studado de la angla lingvo mi deziras interŝanĝon de anglaj (aŭ amerikaj) ilustritaj ĵurnaloj kontraŭ samspacaj germanaj. Bonvolu adresi al Ludwig Goppel, Horrem, b. Köln, Ludendorffstr. 55, Germ. [2]
 S-o Emrique Sarralde, str. Luchana 8 y 10, en Bilbao (Hispan.) volonte interŝanĝas pm. kaj korespondadojn kun ĉiulandaj samideanoj. [5]
 Je mia anonco pri korespondo mi ricevis tiom da respondoj ke al mi ne estas eble, skribi al ĉiuj. Mi tial petas ilian pardonon. Gust. Johansson en Falun. [5]
 S-o Otto Niische, Petersburgerstr. 46 en Berlin O. 34, sendas tuj 100 germ. pm. kontraŭ sama kvanto de alia lando. [5]
 S-o St. Sabalis en Wilno (Polujo) str. Wieka 2(30)—2 interŝanĝas pm. polajn, rusajn kaj sovietajn kontraŭ alilandaj. [2]
 S-o Walter Schimek, en Trautenua, Feldgasse 8, (Ĉeĥoslovakio) deziras korespondi per il. pk. kaj let. kun gesamideanoj de la tuta mondo. Interŝanĝas ankaŭ pm. kaj ĵurnalojn. [2]
 Kontraŭ 100-200 diversaj poŝtmarkoj sendas samkvanton da rumanaj: S-o Samuele Szentkirályi, direktoro de Scoala Superioara de Comert en Cluj (Ruman.) [1]
 S-o Gösta Henriksson en Sandviken (Sved.) deziras korespondi letere aŭ poŝtkarte kun fraŭlinoj de la tuta mondo. [1]
 Deziras interŝanĝi pm. el Italujo kaj koloniojn kun pm. el Balkanaj landoj Luigi Bruzzone, 19-10 Piazza Sarzano, en Genova (Italujo). [1]
 Deziras interŝanĝi pm. el Italujo kaj koloniojn kun pm. el Danzig, Memelgebiet kaj Balтикаj landoj. Mario Piazza, 15-2, via Ponte Carignano, en Genova (Italujo) [1]
 S-o Jozef Škabarca, Kreščatik 35, en Kiev (Rusl.) deziras interŝanĝi pm. kaj il. pk. kun ĉiulandaj samideanoj. Volonte mi akceptas poŝtmarko-katalogojn kontraŭ sovetaĵoj aŭ rusaj pm. malnovaj. [1]
 S-o Vittorio Bonavia, en Spalato (Jugosl.) interŝanĝas pm. (50-100 pecoj) kun la tuta mondo, escepte Germanujo, Aŭstrujo, Hungarujo kaj Polujo. Mi resendas samkvante kaj samvalore de jugoslavaj pm. — Ne sendas unue. [1]
 F-ino Helene Enke, Rockwitzerstr. 9, I en Dobritz b. Dresden (Germ.) deziras interŝanĝi pm. kun ĉiuj landoj. Sendu nur bonajn, sufiĉe grandkvante, sed ne bagatelojn. [1]
 Fraŭlo Boris Burakov, Nowe miasto ul., Slawkowska n-o 1, en Nieswicz (Polujo) deziras korespondi kun la tuta mondo per leteroj kaj il. pk. Interŝanĝas pm. [1]
 S-o Dr. Holas, juĝisto, Anenská 10 en Brno (Ĉeĥoslovakio) deziras interŝanĝi il. pk. kaj pm. kun ĉiuj landoj. [1]
 F-ino Kuracisto Ruth Davis, 550 Kings Highway, Brooklyn, N. Y., U. S. A., volas korespondi kĉl. pri kuracistaj kaj sociaj temoj. [1]
 F-ino Ireno Schwarz, Sobinowska ul. 55, en Prešov (Ĉeĥoslovakio) deziras korespondi kun ĉiulandaj Esperantistoj, kolektas il. pk. (fl.) [1]
 Poŝtmarkoj el orientaj landoj vi plej malĉaraj akcefas. Ĉe Eldonejo „Esperantista Voĉo“, en Jaslo (Pollando). Ni sendas pm.-elektojn kontraŭ bonaj referencoj aŭ mondepono. Interŝanĝas pogrande; fuosendoĵoj malakceptataj. [6]

Por Distrado.

KONTRAŬMILITI SIN MEM — ESTAS LA PLEJ MALFACILA MILITO; VENKI SIN MEM — ESTAS LA PLEJ BELA VENKO.

F. von Logau.

Paŝao Hasano.*)

Originalo de Stevan Živanović.

La plena luno iras sian eternan vojon tra la universo. Trankvila kaj majesta vintra nokto, en kiu glaciĝas la akvo, regas en la tuta ĉirkaŭaĵo. La neĝoflokoj de hieraŭ kristaliĝis sur la arboj donante al la ĉirkaŭaĵo misteran aspekton. Nigra, iam forta basitono, ŝajnas kvazaŭ elkreki el la neĝo. Forte ĝi staras ankoraŭ obstinate al la babilanta, larĝa rivero, kiu per sia malvarma ektuŝo eterne kisas unu flankon de ĝia fundamento apud la bordo. Ĝi obstinas kiel ĝi obstinis iam al la sangosoifa, malsana ambicia paŝao Hasano, kiu lasis sian vivon ĉe la muroj. Nun, oni rakontas, tiu sango-soifulo fantome vivas funebrante sian unuan malvenkon... Li — oni diras — vagas ĉiunokte sur la muroj kaj veturas en boato sur la rivero...

Trankvilo estas ĉie. Reĝino Nokto forportis la tagan bruon, regante la tutan ĉirkaŭaĵon. Nur la noktuloj kaj la strigoj ne obeas al ĝi. De tempo al tempo ili ekkrias, interrompante la festan silenton de l' serena lunonokto plibeligata per la tremetado de l' helaj steloj. Iliaj voĉoj ŝajnas esti la portantoj de l' malfeliĉo. Ilia krio maltrankviligas la homajn korojn.

En la unua etaĝo de l' bastiono lumas kandelado. Ĝia tremetanta lumo lumigas per duonhelo la ĉambron. En angulo brulas en fajrujo la fajro. La malvarmeco, kiu ekstere estas forta, ĉi tie ne estas sentebla. En varma aero tiumomente regas terura silento. Nur la lumo tremetas, kaj la flamo de l' kandelado neaŭdeble tien kaj reen moviĝas. Kiel fantomo, kiel ŝtelisto, la luno ankaŭ rigardas en la ĉambron.

Ce la lito la patrino premas sian kapon per la manoj. Per siaj kubutoj ŝi sin apogas sur la liton, en kiu kuŝas ŝia infano. Ŝi dormetas, ŝia infano estas malsana kaj dormas.

Jam la noktomezo alproksimiĝis, kiam la silento estis interrompata. Terura krio ekdidiĝis en la subtegmentejo:

„Huhu, huhuu!“ ripetigis multfoje.

La patrino vekigis el sia dormeto pro la huhuado de l' strigo.

„Dio kompatema, mi antaŭsentas malfeliĉon. Ah, mia infaneto!“ la patrino estis ekkrianta, sed rigardo al la dormanta infano, kiu malfacile spiris, sufiĉis por ŝanĝi ŝian emon. Ŝi timis veki sian knabeton.

„Ĉu oni povas kredi je antaŭsignoj? Ne, certe ne, la kuracisto diris al mi hodiaŭ matene, ke la krizo, kiu nepre venos nokte, eble ne estos vivodanĝera. Eble la krizo eĉ ne okazos, eble mia infano estas nur malsaneta je pulmoj? Jes, certe, la kompatinda knabo nur iomete malvarmumiĝis!

*) En la jaro 1893 paŝao Hasano, tiama estro de turka Bosnio, ĉe la muroj de l' urbo Sisak (Sisci) estas venkita kaj mortigita. La rivero, kiu hodiaŭ fluas apud la bastiono, tiam estis pli malproksima.

Scienco.

Klarigo

de dekstromaneco per turniĝo de la tero.

La laboroj de rusa scienculo S. Parhomenko pri la fenomeno, ke plimulto da homoj por laboro preferu uzas dekstran brakon, kondukis al jena rezulto: Sur la norda duono de la terglobo homoj kiel ankaŭ bestoj estas plej multe dekstruloj, sur suda — maldekstruloj, kaj en ekvatoro ambaŭmanuloj. Li trovis, ke kaŭzo de tiu malsimetriro estas la turniĝo de la tero, aŭ pli ekzakite, la dekliniga forto de la terturniĝo.

Bedaŭrinde la izoliteco de Rusujo ne donas eblecon trovi ĉiujn statistikajn materialojn necesajn por argumentado de tiu teorio. Pro tio estas peto al Esperantistoj de la tuta mondo komuniki statistikojn pri disvastigo de dekstro-, maldekstro- aŭ ambaŭmaneco inter homoj (precipe indiĝenoj) kaj bestoj vivantaj en terpartoj sude de ekvatoro, Suda Afriko, Aŭstralio, Argentino ktp. al

S. Parhomenko en Kazan, Rusio, strato de Karl Marks, domo 41, loĝejo 2.

Trovo de plateno en Siberio.

Geologo Prof. A. N. Zanaricki kaj liaj kunlaborantoj esploris en distrikto de Nijne-Tagilsk (Uralo) tielnomatan dunit-ŝtonaĵojn kaj konstatis, ke ĝi enhavas eksterordinare grandan procenton da plateno: en kelkaj specimenoj eĉ 750 ĝis 1000 gr. en 1000 kg. da ŝtonaĵo.

Preskaŭ samtempe estis konstatita enteno de 250 gr. en 1000 kg. de ŝtonaĵo en specimenoj de nigra tero tre disvastigita en orienta Siberio, kiujn alportis ekspedicio de geologo Urvancef el regiono de Narijsk (sur dekstra bordo de malsupra parto de rivero Jenisej).

„Huhu, huhu—u!“
Terura huhuado ripetigis. — Ĝi vekis la infanon. La bela brunhara, apenaŭ sepjara knabo malfermis siajn okulojn. Lia brusto forte ondemovigadis. Apenaŭ li povis spiri. La patrino lin timeme ekrigardis demandante:

„Orulo kara! — Ĉu vi povas spiri?“

„Jes, patrineto! Kiu kriis sub la tegmento?“

„Mi timas!“

„Strigo!“

„Ne, — paŝao Hasano — tio estas, jes, li!“

La karesemaj, konsolantaj vortoj kvazaŭ fluus el la buŝo de l' patrino. Ŝi kaŝe viŝis la larmojn, tenante la alian manon sur la frunto de l' infano. La knabo havis altan temperaturon, li parolis en deliro.

Longe tiel karesis la patrino lian frunton, kaj li silentis.

„Huhu, huhu—u!“

„Patrineto, ien li venas, li, paŝao Hasano!“

„Ne, ne, infaneto! Ne timu, mi estas ĉe vi, via patrino, via gardantino!“

La knabo levigis sidante en la lito.

„Li venas, gardu min! — Ne donu min! — Li min mortigos!“

La lastajn vortojn li ekkriis per forta voĉo.

En ĝi tremis io tiel timema, ke eĉ la patrino ĉirkaŭrigardis la ĉambron.

„Huhu, huhu—u!“

Teruregan malvarmon ĝis la ostoj eksentis la patrino. La infano ekkriis laŭte:

„Kuru for, portu min, li venas!“

En la apuda ĉambro vekigis la patro kaj, metante sur sin blankan noktan surtuton, malfermis la pordon.

La bruo de l' pordo igis la infanon direkti siajn okulojn al ĝi. Ekvidinte sian patron en blanka surtuto, li metis siajn manojn sur la okulojn, kvazaŭ li volus kovri teruran bildon. Falante en la liton li kriis:

„Jen, paŝao Hasano!“

La patro alkuris al la lito. La knabeto kuŝis malfacile spirante, kiu fermiĝis okuloj. La spirado iom post iom trankviliĝis. Fine ĝi tute kvietiĝis...

Senvorte la patro kaj la patrino ekrigardis dolore unu la alian. Poste la patro prenis de l' tablo la kandelon por meti ĝin en la manojn de l' mortinta knabo.

Tuj la patrino ekkomprenis la signifon de l' kandelado en la manoj de ŝia infano. Ŝian vizaĝon kovris larmoj.

La patro iris al la fenestro. Kun koro rompita, sed per sekaj okuloj li ekrigardis la lunradiojn, kiel ili kisas la larĝan riveron, kiu fluas mormurante al sia celo...

Stranga Heroaĵo.

Kiel la bela lingvo savis la vivon de juna kaj naŭva Londona Esperantisto.

Okazas ĉiudimanche, en la mezo de „City“ de Londono, kunveno Esperantista nomata „Dimanĉa Rondo“.

Sendube la legantoj memoras ĉi tiun rondon, ĉar antaŭ nelonge, ĝi prezentis sian unuan sed bonegan teatraĵon al la „Londona Esperanto-Klubo“, kaj aperis en „Esperanto Triumfonta“ raporto pri la afero. Sed, mi daŭrigu, ĉar tio ĉi vere ne havas rilaton al la „stranga heroaĵo“ — pardonu — mi preskaŭ diris „stranga heredaĵo.“

* * *

En malgranda ĉambro sur la dua etaĝo aŭdiĝas la zumado de stranga aro, babiladanta pri nenio, irinketanta teon, manĝanta kukon kaj poste penanta kanti Esperantajn kantojn. Subite ĉiu eksilentas, kaj tra la ĉambro sonas la sonoraj vortoj de la prezidanto. Nun ni aŭskultas la voĉon de la parolanto, kiu penegas sensukcese konvinki la ĉeestantojn per siaj eksterordinaraj pensoj.

Tamen, ĉio bona devas iam finiĝi, kaj post iom da tempo foriras, unu post la alia, la amikoj de l' rondo.

Jam noktigis, kaj tra la mallumaj stratetoj de la ordinare homplena „City“, vagas junulo, malgrasa, malalta junulo, kiu montras sur sia vizaĝo la kuraĝan aspekton de tiu, kiu „tra neĝo, glacio standardon portanta, kun tia devizo mirinde sonanta: Exelsior!“, antaŭeniras hejmen.

Fine, preskaŭ nevidebla pro la nebuleto, kiu ekestas, li malrapide atingas la celon, tiel longe aspiritan de li. Estas la ponto „Hungerford“.

Jen, li staras ĉe la sojlo de la ĉiam malfermita pordo de l' aventurado. Sed li ne atentis, li eĉ ne scias, ke ĝi lin atendas.

Antaŭ ol mi daŭrigos la rakonton, estas necese ke mi klarigu al la leganto, kia loko estas la ponto „Hungerford“. Tiu ĉi ponto kondukas, je la flanko de „Charing Cross“ fervoja ponto, trans la riveron Tamizo, en unu el la plej aĉaj vizitejoj de la Londona krimularo, kies reputacio estas absolute malbonega. Ĉi tiu loko, nomata „Waterloo“, estas ĉiama ĝeno al la policanoj, kiuj diras, ke estas malfacilege ordigi la enloĝantojn, precipe nokte.

Kiam la junulo atingas la supron, ŝajnas al li, ke estas neniu alia sur la ponto, kaj li antaŭenpaŝas. Duontrane, subite li ekvidas du mianĉajn personojn kies vizaĝoj malpuraj sufiĉus mortigi, se aspektoj povus tion fari, kaj kies vestaĵoj ireege bezonas renovigon. La junulo iom tremante haltas, la aliaj ridaĉante antaŭenvenas, ankaŭ haltas, kaj baras la vojon al la nun timanta Esperantisto, ĉar samideano li ja estas. Terurai pensoj rapidegas tra lia kapo. „Kion ili deziras, kion ili faros?“

Sed subitege, kiel fulmero, bonega ideo frapas lian cerbon. „Kion ajn ili diros, mi ŝajnis ne kompreni“, nia amiko pensas, kaj jen pliproksimiĝas la teruloj. La unu, forta kaj grasa viro, timige demandas angle: „Ĉu vi havas liton por la hodiaŭa nokto, sinjoro?“

Rapide la junulo pensas: „Kion fari? Ĉu respondi? Ne, jes, ne, jes. Ha! Bone! Mi respondos al li Esperante!“ kaj li diras: „Pardonu, sinjoro, sed mi ne komprenas!“

La fortilo: „Eh! Français?“

Nia heroo: „Ne, ruso. Ruso, ruso, ĉu vi komprenas?“

La fortilo: „Sprechen Sie Deutsch?“

Nia heroo: „Ne, mi ne komprenas!“

„Ho!“

Tiam alvenas alia piediranto, kaj la junulo estas libera, sed — nur dum iom da tempo, ĉar tuj, kiam la alia preterpasas, la du friponoj rapide persekutas nian kompatindulon, atingas lin kaj denove baras al li la vojon.

„Jen la fino“, li pensas, kaj aŭdiĝas mallaŭte en liaj oreloj la sonoriloj de l' proksima preĝejo. Kvazaŭ nebulo aperas antaŭ liaj okuloj, kaj tra ĉi tiu li malklare vidas la pordojn de l' ĉielo. Ĉiuj liaj surteraj pekoj trakuras lian cerbon, kaj li pretigas sin foriri de ĉi tiu al li feliĉa mondo, kiam la revo akre finiĝas.

ilojn, ĝia valoro estis 16 000 fk. Kudriloj fabrikita el tiu fero havis valoron de 32000 fk. kaj horloĝorisortoj eĉ 425 000 fk. Tiamaniere la valoro de la sama ferpeco alĝis la prilaborado, laŭseke pli kaj pli speciala.

Amasa fabrikado povas malaltigi la prezojn, altajn ĉe unusola ekzemplero. Maŝino, ekzemple, farita unufoje kostas 10 000 kr., se fabrikiĝas 100 ekzempleroj unu kostas nur 2—3 000 kr.

La tekniko estas vera propagandanto de la demokrateco. Multego da bezonaĵoj, sen kiuj nun neniu povus facile vivi, estis granda lukso. La ŝtrumpoj, ekzemple, estis en la mezepoko tiel multekostaj, ke sole nobelulinoj povis uzadi ilin. La multekostecon de la pinglo atestas tiu, ke la franca reĝo Ludoviko XI-a donacis al sia edziniganta filino skatoleton da pingloj. La progresoj en la amasa fabrikado ebligis, ke tiaj bezonaĵoj fariĝis posedado de ĉiu. Al la eltrovo de la prezo kaj de la reprodukta tekniko ni dankas por la ebleco disvastigadi la kulturon kaj arton en la plej vasta publiko.

Kiel progresadis la pliboniĝado en la fabrikado de la aluminio, ni povas konstati laŭ tiuj ĉi prezoj: en 1855 la prezo de unu kilogramo da aluminio falis de 2000 frankoj al 200 fk., sekve de la procedo de Héroult al 35 kr., en 1891 unu kilogramo kostis sole 3 kr., antaŭ la milito jam nur unu kronon kaj duonon. Ankaŭ la valoro de la oro falus, se oni sukcesus ekspluati ĝin el la marakvo.

Pro la pliperfektiĝo de la tekniko transporta kaj konserva, precipe pro la plirapidigo de la transporto ni povas konatigi al ni fremdajn produktojn kaj nutraĵojn, kiuj alie venus difektitaj. Tiel ankaŭ ni, enlanduloj, havas marfiŝojn, aŭstralian viandon kaj amerikajn pomojn, relative malmultekoste (El la ĉeĥa „Triumfy techniky.“) Hnd

Diversaĵoj.

Efiko de la tekniko je la valoro kaj prezo de objektoj.

La valoro de la karbo, kiam oni tiun ĉi uzus sole por hejti en la kuirejoj, estis tre malgranda. Nur per eltrovo de la vapormaŝino kaj per pli vasta uzado de la karbo en fabrikejoj kaj ĉe transporto fervoja kaj ŝipa, la valoro de la karbo altiĝis tiel, ke ĝi permesas eĉ malproksiman transporton. Ekzemple, ĉeĥa kaj pola karbo estas importataj en Aŭstrion, anglan karbon oni importadis eĉ en Italion kaj Egipton.

Simile altiĝis la valoro de nia enlanda argilo, se oni sukcesus fabrikati el ĝi aluminion, kiun oni ĝis nun ricevas el eksterlanda baŭksito.

Kiel la valoro de ferstango altiĝas per prilaboro je diversaj fabrikaĵoj, tiun lu statistikisio jene montris en antaŭmilitaj prezoj: Simpla stango kostis 35 frankojn. Se oni faris el ĝi hufferojn, ĝia valoro kreskis je 60 fk., per prilaborado de la stango je manĝotranĉiloj ĝia valoro altiĝis je 380 fk. Se oni uzis la feron por fari el ĝi poŝtranc-

„He! Sinjoro, ĉu vi havas pencon por ni?“ Demandas unu el la vaguloj.
 „Mi ne komprenas, iute ne!“
 „Se vi, ne donos al ni monon, ni rompos vian malbenindan kolon!“
 „Eh! Kio!? Se vi ne liberigos min, mi kondukas vin al la policoj; ĉu vi komprenas? Polico! Polico! Polico!“
 „Ho! Ni venos kun vi al la policoj“, ili ambaŭ respondas. „Zorgu! Ni frapegos vin, porkaĉo!“

Sed feliĉe por la juna Esperantisto, en tiu momento alproksimiĝas kelkaj personoj, kaj insultante la du krimuloj forkuras de la loko. La infamita junulo ekspiras pli libere ol antaŭe kaj denove daŭrigas sian vojon.

Ĉiu tiu preskaŭ nekredibla rakonto montras, kiel nia lingvo savis la vivon de fervora Esperantisto, kaj ankaŭ, ke eĉ malbone edukitaj personoj povas kompreni kelkajn vortojn Esperantajn (ekz. ruso, polico kip.), kiam ili aŭdas la internacian lingvon, la unuan fojon, kvankam ili parolas, kaj nur aĉe parolas, sian patran lingvon (la anglan), kaj eble du-tri francajn kaj germanajn vortojn, lernitajn dum la milito en Franclando. Sendube la junulo estis trege bonŝanca, kaj nur pro tio, ke li parolis Esperante, kaj per tio konfuzis la du aĉulojn, li evitis la danĝeron.

Sed, la stranga afero pri ĉi tiu rakonto estas la fakto, ke ĝi estas absolute vera. Mi estas certa, ke neniu el vi kredos tion, sed la aventuro okazis al unu al la plej viglaj kaj bone konataj Esperantistoj en Londono la 14-an de januaro 1923, inter la naŭa kaj deka horoj, kaj la skribinto de tiu ĉi artikolo, kiu ŝajnas al vi plena je mensogoj, estas lia amiko, kiu aŭdis la tutan okazintaron de la lipoj de „nia heroo“, la sekvintajn tagojn.

Geo T. Smith, London.

Esperanta Gazetaro.

Jen tufreŝaj la gazetoj
 El la Esperanta lando,
 Kun konsilioj de profetoj
 Pri moderna propagando,
 Kun raportoj vere-veraj
 Ĉi duone fantaziaj,
 Kun promesoj helesperaj,
 Kun sukcesoj sensencaj!

Tamen ĉiuj tre ĝentilaj
 Kaj entuziasmplenaj,
 Ĉu sciencaj, ĉu babilitaj,
 Ĉiuj estu nun bonvenaj!

„Esperanto de Genevo
 Kaj de UEA gazeto,
 Legu ĝin — jen via devo,
 Pagu ĝin — jen mia pezo;
 „ar ĝi estas veterano,
 Gloru ĝin samideano!“

„Esperanto Triumfonta“,
 La semajna grand-jurnalo,
 Kun enhavo diversfanta,
 Temas nur pri aktualo;
 Estas ĝi semajna pano,
 Manĝu ĝin, samideano!

Kaj folioj fliz-malsanaj
 El gazeta superfluo,
 Kaj la gesamideanoj
 Tamen dormas pro... enuo!
 Mokridaĉas la satano,
 Ploru vi, samideano!

A. Schwartz de la „Verda Kato“.

Humoro.

El notaro de Bibabo.

Dum kongreso de pedagogoj. Diskuto varmigiĝas. Prezidanto skuegas sian sonorileton. Bruego daŭras. Prezidanto rimarkas sian interrompenton kaj furie kriegas al li, laŭ lerneja kutimo: He, vi feliĉe vi kopios al mi centfoje frazon »Ex nihilo nihil...«

„Sinjor' kuracisto, helpu min, mi sentas kapturniĝon.“ „Tio certe venas pro manko de aero! Vi do havas sidan okupon en la ĉambro?“
 „Ho, ne, mi estas aviadisto“ ...

Patro: „Mi legas en ĉiaj okuloj, ke ĉi diras mensogon.“

Fileto: „Ho, paĉjo, mi cin ne kredas, ĉar ĉi ja ne povas legi sen okulvitro!“

„Kio grandigiĝas malgrandiĝante?“ „Komo! Ĉar la kometo ja estas grandega.“

Bibliografio.

Nar duoble ricevita librojn, prospektoln k. s. ni mencias aŭ recenzas. Kiam libro aperis b. d. i. e., ni metas minimume unu b. d. i. e. ekzempleron.

Libroj kaj recenzoj.

P. Christaller, Deutsch-Esperanto-Wörterbuch, 2-a eldono. Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel, G. m. b. H. Berlin und Dresden 1923, 660 paĝoj, 12:18.5 cm, tute bindita, prezo por Germanujo gmk. 12.— × ŝlosilino, por la eksterlando sv. fk. 12.—

Jen la delonge de la germana samideano atendita ampleksa vortolibro. Eksterajo, arango kaj prezo estas modelaj. Detala recenzo sekvas.

Eugen Wüster, Maŝinfaka Esperanto-Vortaro Priele-menta (Germana eldono) Maschinentisches Esperanto-Wörterbuch der Grundbegriffe (Deutsche Ausgabe), Ferdinand Hirt & Sohn, Esperanto-Abteilung, Leipzig 1923, 89 paĝoj, 12:18 cm, kartonita.

Dua dezirinda aperaĵo por niaj germanaj samideanoj. Eksterajo moderna, arango kaj prezo bonegaj, kiel ĉiuj eldonaĵoj de tiu ĉi firmao. Wüster havigas per tiu ĉi verko bonegan helpon al la praktikisto. La libro estas duparta laŭ nova principo aranĝita kaj enhavas la jenajn terminojn: La maŝinlemlito, maŝino, plej gravaj esprimoj en la konstruado kaj teknologio. Recenzo sekvas.

Josef Weisbart, Medial, International komun-lingue, Nürnberg.

Tri Noveloj. De A. S. Puŝkin. El la rusa originalo tradukis D-ro A. Fiŝer 1923, 67 pĝ. Kartonita. Hirt & Sohn, Leipzig. Internacia Mondliteraturo n-o 10. — Prezo: 1.20 sv. fk.; por malbonvalutaj 1.20 gmk. × ŝlosilnombro.

Jen la lasta ĝis nun aperinta volumo de la I. M. L. — Puŝkin, jam konata al ni pro la malgranda rakonto „La pafo“, estas tiu el la rusaj verkintoj, kiuj ĉerpis siajn temojn el vivo reala. Ne atinginte la supron de sia gloro, li mortis jam 38-jara sekve de duelo. — (Verdire la libro li mortis jam du al ni nekonzistaj rakontoj, ĉar la „pafo“, ĉi supre menciita, formas la trian parton de l' volumo. — Mi trovis kelkajn gramatikajn malkorektaĵojn („spite tio“ anstataŭ „spite al tio“ aŭ „spite tio“, k. a.) Kaj du preserarojn. — Ankaŭ ĉi tiun dekan volumon la samideano tro valente akceptos.

G. Ajul.

Aventuro en la Novjara nokto. De Heinrich Zschokke. Tradukis K. Brüggemann. Universala Biblioteko n-o 6. 72 pĝ. 10½:16 cm. 1923 Esperanto-Verlag Friedrich Ader, Dresden A 27. Recenzo: 0.60 gmk × ŝlosilnombro, por bonvalutaj landoj 0.60 sv. fk.

En rapida sinsekvo la eldonisto aperigas siajn bonegajn volumetojn. Unu ni priparolos la kvaran numeron de la Universala Biblioteko (La Almuzulino de la „Ponts des Arts“) kaj jam sekvas alia klasika literaturo, novelo de l' poeto germana Zschokke (1771—1848). Preĉipe ĉi tiu alloga rakonto estas unu el la plej valoraj el liaj noveloj kaj la leginto ĝuos agrablajn horojn, kiujn la „Aventuro“ al li donos.

G. Ajul.

Sonatino

de Rubén Darío

La princino malgajas . . . Kion sentas princino?
 Sopirajo forkuras el la buŝ' de feino,
 ĉar ŝi perdis la ridon, ĉar forigis kolor'.
 La princin' sidas pala sur la seĝ' sia ora,
 la klavar' estas muta de l' piano sonora,
 kaj en glas' forgesite dolĉe ŝvenas rozflor'

En ĝardenon la triumf' de la pavoj sin tiras,
 dommastrin' habileme banalojajn eldiras,
 kaj ridigas tuluĝa histriono je si
 La princino ne ridas, ŝi fariĝis sentsenta,
 la princin' persekutas tra ĉiel' orienta
 Konfuzigan libelon de konfuz-luzi'

Ĉu ŝi revas je l' princ' el ekstrem' orienta,
 Pri nobelo veninta per kales' elargenta,
 por vidadi lumdoloĉon de l' okuloj de ŝi?
 Aŭ pri reĝ' de l' insulo de rozar' aromanta,
 aŭ pri l' estro fiero de l' ston' diamanta,
 aŭ pri l' mastro de l' perloj Ormuz' idoldi'?

Ha!, princin' malfeliĉa kun la buŝo lilia
 volas esti hirundo, esti malpapila,
 forflugadi rapide sub turbulo-ĉielar';
 iri sunon lau skalo de arĝintaj ŝiraĵoj,
 salutadi illojn per la majaj versajoj
 aŭ perdiĝi en la vento super tondro de l' mar';

Ne plu volas palacon, nek ŝpinilon amatan,
 nek balkonon sorĉitan, nek ludistojn skarlatan,
 nek la cigojn neĝblankajn sur la lag' en blund'.
 Kaj malgajas la floroj pro la flor' de l' reĝejo;
 la jasmen' orienta, la levkoj' de l' nordejo,
 okcidentaj daltoj kaj la rozoj de l' Sud'.

Malfeliĉa princino kun la blujaj okuloj!
 Kaptis ŝin la orajoj, kaptis ŝin ŝiaj tuloj
 en la kaĝon marmoran de la reĝa palac';
 la palaco pompega, ĉirkaŭita de gardoj,
 kiun ŝirmas cent negroj kun la cent halebardoj,
 leporhund' nedormema kaj de draka minac'.

Ho virin' Hipsipil'! — krias buŝ' malbanala —
 (La princino malgajas. (La princin' estas pala).
 Ho revata vizi' el or', arĝent' kaj ebur'!
 Kiu flugas en landon, kie princ' goje majas
 (La princin' estas pala. La princino malgajas)
 ol la sun pli brilanta bela pli ol lazar'!

El la „Camera Obscura“. De Hildebrand. El la holanda originalo tradukis H. C. Mees. 1923, 64 pĝ. Kartonita. Hirt & Sohn, Leipzig. — Internacia Mondliteraturo n-o 5. Prezo: 1.20 sv. fk.; por malbonv. 1.20 gmk. × ŝlosilnombro.

La kvina volumo sin prezentas al ni pure holande laŭ la karaktero de la interesa enhavo. — Camera Obscura i. e. ĉambro malhela (delfina vortoj) okupas en la nederlanda literaturo unikajn lokojn. Ĉi estas kolekto de rakontoj kaj priskriboj de delikata kaj ofte sprita spirito kaj havas grandparte nacian koloron. Ĉiuj instruista holandano konas ĉi tiun maistroverkon de Nikolaas Beets, kies pseudonimo estas Hildebrand. — Tute kontraŭe al la skribmaniero de rusaj poetoj Beets ŝatas skiti bildojn de anima travankvico kaj ĉirkaŭas la leganton per beza atmosfero, kiun la nordokcidenta parto de Eŭropo algrade estigas.

Entute la traduko estas bone farita, sed ne ĉie en la libro mi ŝatas la stilon (vidu pĝ. 41); mi ankaŭ trovis lingvajn strangaĵojn kaj malkorektaĵojn, kiujn mi ne estis atendinta en tia volumo.

G. Ajul.

Legendoj. De A. Niemjevski. Kun permeso de l' aŭtoro el la pola originalo tradukis Bronislaw Kuhl. Kun antaŭparolo de Antoni Grabowski. Dua korekita eldono. 1923, 74 pĝ. 13:19 cm. Kartonita. Internacia Mondliteraturo n-o 2. Eldonis Ferd. Hirt & Sohn, Leipzig, Esperanto-Fako. Prezo: 1.20 sv. fk.; por malbonv. 1.20 gmk. × ŝlosilnombro.

En formato adaptita al la ceteraj numeroj de Internacia Mondliteraturo aperis dua eldono de la kvar poeziaj rakontoj kaj bildoj el la vivo de Jesuo, kies nomo, kvankam li estas la ĉefa heroo, nenie estas dirita, sed lasita al la konjektemo de la legantoj. La libreto potence imitas la animon, kaj ne estas dubo, ke ankaŭ ĉi tiu korekita eldono trovos novajn amikojn. — Mi refero ĉi tie rimarkigas, ke la kolekto de I. M. L. estas submetita al la kontrolo de Prof. D-ro I. Dietterle, membro de la I.K., kies nomo donas ĉiun garantian rilate bonecon de stilo, lingvon kaj — laste-nelaste — de la enhavo. Al ĉiuj, kiuj deziras kompletigi la serion, mi devas diri, ke la sesa volumo Irving Washington: „El la skizlibro“, aperos nur en aŭtuno.

G. Ajul.

Elektitaj Noveloj. De Ivan S. Turĝenjev. El la rusa originalo tradukis Alexandra Mexin. 1923, 81 pĝ. Kartonita. Hirt & Sohn, Leipzig. — Internacia Mondliteraturo n-o 3 — Prezo: 1.20 sv. fk. por malbonvalutaj landoj 1.20 gmk. × ŝlosilnombro.

La librokolekto „Internacia mondliteraturo“ havas la taskon konigi al la Esperantistaro per karakterizaj verkoj la plej famajn verkistojn de diversaj nacioj. Sendube la rusa poeto Turĝenjev meritas esti nomata unu el la plej klesikaj de sia lando. — La tradukinto, kiu nuntempe vivas en Svislando, elektis por sia libreto la kvar plej bonajn novelojn de l' poeto, kiujn li verkis en diversaj periodoj de sia vivo. La loko ne permesas al mi diri detalaĵojn pri la poeto aŭ pri lia verkado; cetero, homo kiel Turĝenjev ne bezonas ian ajn reklamon aŭ laŭdon. — La lingvo estas bona; laŭdinda estas la klarigo de ne al ĉiuj konataj vortoj kaj esprimoj per piednotoj. Kelkaj menciindaĵoj ne estas gravaj. Anstataŭ „legi al ŝi laŭvoĉe“ mi dirus „voĉe legi al ŝi“, ĉar ne estas dirite, ke oni legis per „laŭta“ voĉo.

G. Ajul.

Gazetoj.

Literatura Mondo, junio. Adreso: Budapeŝt VI, Andrassy ut. 81. — Kun arta, tricolora kovriljo. Kunlaborejoj de Petro Stojan, Rudolf Hromada, J. Grau Casas, P. Medem, J. van Schoor, Karlo Bodó, J. Baghy, T. Schwarz, Teo Jung, L. Sumitz, M. Solovjev, J. Werner kaj Kelkal el la literaturajoj estas pramiitaj de la IX-aj Int. Floral Ludoj. — Muŝika eldono: Estona Popolkanto. — Belaj reproduktajoj, portreto, vinjetoj.

Pola Esperantisto, majo-junio. Detala raporto pri Kvara Konferenco de Pola Esp. Soc. en Poznań.

Internacia Medicina Revuo, n-o 3.

La Fervojisto, n-o 1. Julio. Adreso: Olomouc, Ĉeĥoslovakio, Müllerova ulice 24.

Dia Regno, julio.

Amerika Esperantisto, majo. Anglalingva raporto pri la Dana-Esperanta Eksperimento de Wellesley College.

Ho'and: Esperantisto 30. 6.

Der Arbeiter Esperantist, Breslau VIII. Julio. Artikolo pri kunigo de L. E. A. kun A. L. L. (organiza problemoj).

La Federacio de la Mondo, Box 47, Fremantle, Okc. Aŭstralio, n-o 1. Esperanta Bulteno por propagando la principojn de la „Ulmismo“, la nova plano por certigi mondpacon per pacema rekonstruado. Senpaga. Aperanta laŭokaze.

Hal silentu! silentu! — bapfino ŝin diras —
 sur ĉeval' kun flugiloj ŝin ĉi rapidiras,
 kun la glav' kaj ĝasbirdo ŝin ĉi venas jam
 kavalro felĉa vin amanta kun forte
 el nubej' alvenante post venkado de l' Morto
 viajn lipojn ardigis per brulkis' el junam'!

Tradukis el la hispana lingvo C. Calleja

Kruela sorto. Pro E. H.

Ekamis mi je la unua fojo
 Knabino, ho, prudentan kaj bonkoran.
 Ekregis kvazaŭ supertera goĵo, —
 Dissendis ŝia kor' lumadon oran.
 Kaj tiom nun da goĵo min pleniĝis
 Ke dubis mi: ĉu vivas mi sur tero,
 Au ĉu l' anim' de l' korpo sin malligis
 Kaj ŝvebas en ĉielproksima stero?
 Sed ve! forpelis el la paradizo
 Nin tro rapide nigra tagfantomo'.
 Kaj min atingis jene sortovivo:
 „Repagu por felĉa ĉi ajn iomo!“
 Kaj jam okazis la terura io:
 Knabino mia grave malsaniĝas;
 Kaj baldau jam suriris ŝi al Dio.
 Kruela sorto! — mia kor' rompiĝas!

Friedrich Hahn, Bremen.

Vi parolas pri centmiloj da Esperantistoj!
 Pruvu, ke ekzistas dekmil!

UEA BEZONAS DEKMIL MEMBROJN.

ALIĜU AL UNIVERSALA ESP. ASOCIO!

Kiel vivokostoj diferencas tra la mondo.

Ĝenerala ekzameno de vivokostaj indeksoj montras, ke la tendenco al firmiĝo, kiun oni rimarkis dum pluraj monatoj, daŭras ĉiutage, kun escepto de la landoj, kie la malfirmeco de la valutoj nature okazigas ŝanceliĝon de prezoj. Laŭ artikolo en la „Int. Labora Revuo“, la movado de pomalgrandaj prezoj nur iom malcerte sekvas tiun de pograndaĵaj prezoj. Kelkatempa mallaligo de pograndaĵaj prezoj en Germanujo je komenco de decembro, ekzemple, ne okazigis respondan movadon de pomalgrandprezaj indeksoj.

Pomalgrandaj prezoj tendencas plialtiĝi en Germanujo, Francujo, Belgio kaj Polujo. En Aŭstrio la prezoj konstante plialtiĝis ĝis septembro 1922, sed de post oktobro okazis sencensa mallaligo, kaŭze de la firmiĝo de la valuto. En aliaj landoj, mallaligo de prezoj ankaŭ montriĝas.

Nenia grava ŝanĝo en pograndaĵaj prezoj rimarkiĝas. En landoj, kie la proporcio de la valuto al ora normo ne estas malaltiginta, ŝajnas, ke la prezoj firmiĝas apud nivelo inter 54 kaj 64 procentoj super la antaŭmilitaj prezoj. Tio okazis, ekzemple, en Usono, Britujo, Kanado kaj Nederlando. En tiuj aliaj landoj, kies valutoj restas bonaj, la preznivelo estas pli alta, ekzemple, en Svislando kaj Japanujo, kie ĝi estas (respektive) 70 kaj 90 procentoj super la antaŭmilita nivelo. (Informservo de Int. Lab. Of.)

Penseroj.

Ĉu ne estas rimarkinde, ke la nomo kiu estas la sinonimo de la idealo kaj ankaŭ la nomo, kiu esprimas la kontraŭon devenas el sama lando, sama raso kaj gento? Ĉi tiu fakto rifuzas la ŝovinistajn avokojn, kiuj kulturas naciajn kaj rasajn antaŭjuĝojn.

Estas proverbo ke iomete da sciado estas danĝera. Tiel estas, se ĝi re enhavas la scion kaj senton de sia kompara nescieco. St. M.